
Esperanto - Rok - Fangazeto

ROK GAZET'

NUMERO 0
Aprilo-Majo-Junio 1990



INFORMOJ
INTERVJUOJ
NOVAĴOJ

KONCERTOJ-FESTIVALOJ
TEKSTOJ

ESPERANTO-ROK-RETO

Eldonas EUROKKA
EUROKKA F-31450 DONNEVILLE

ROK-GAZET'

ROK-GAZET'
Administration-rédaction/
Administrejo-redaktejo
Rok-Gazet' c/o EUROKKA
F-31450 Donneville
Tel (33) 61-81-95-65
Directeur de publication/
Eldon-direktoro
Floréal Martorell
Rédaction/*Redakcio*
Rédacteur en chef/
Ĉefredaktoro
Aline Boulet
Comité de rédaction/
Redaktora stabo
Bertil Wennergren
Bertrand Albault
Mikke Englund
Andrzej Bróda
Dimitrij Lissenko
Collaborateurs/
Kunlaborantoj
Artur Leśniewicz
Jurij Mylnikov
Oleg pavlov
Anna Rittämaki
+adresses dans ces pages/
+adresoj en tiuj-ĉi paĝoj
Dessins/*Desegnaĵoj*
Cruella deVille
Jolo Azra
Photographies/*Fotoj*
Floréal Martorell
Sylvie Baudin
Imprimerie/*Presejo*
IMP 2 rue du marché
81700 PuyLaurens
Distribution/*Disdono*
Associations espérantistes
Esperantistaj organizoj
Pays de l'Est/*Orientaj landoj*
Josef Sučik
Masna 9
CS-70200 Ostrava 1
Dépôt légal à parution
Commission paritaire en cours
Edité par/*Eldonas*
EUROKKA Esperanto-Rok-Asocio

Eurokka skipo 90

Estraro
Brigitte Hénin *Honorprezidantino*
Bertrand Albault *Prezidanto*
Jean-Marc Leclerq *Vic-prezidanto*
Jean Garcia *Sekretario*
Roch Jullien *Kasisto*

Administrantoj
Roger Dine
Mireille Segonne
Aline Boulet
Marie-Christine Lesage
Michel Collobert

Respondeculo
Floréal Martorell

Antaŭ viaj okuloj kuŝas LA fangazeto en Esperanto. Eble la plej malkutima aĵo ekzistanta en la rokmuzika medio.

Ĝi estas por vi malfermita, se vi muzikas, se por vi spekti koncerton estas kiel drogo, se vi demandas vin kiel diable eblas kanti rokan diablan muzikaĵon en tiu fuŝ-diabla lingvaĵo !

Cetere, ni ne parolas nur pri rokmuziko esperantista, sed pri ĉio muzika, ne nur roka, ne nepre esperantista.

Nia espero: ke tiu-ĉi legaĵo informu unue; ŝoku due (laŭsenso de elektra ŝoko), estu ligilo inter la rokmuziko-amantoj. Ke ĝi plaĉu aŭ ne-plaĉu tio ne tro gravas.

Ĉiukaze VI FARAS ĝin. La plej granda parto de la informoj estas eltiritaj de la multaj leteroj, kiujn ricevis EuROKKA.

En la ROK-GAZET' kuŝas adresoj, ili estas la rokmuzika reto, kiun Eurokka celas starigi. Alskribu unu la aliajn, interŝanĝu kasedojn kaj diskojn...

La venonta numero naskiĝos, iam tiam...ĝis kiam vi sendu pli da materialo kaj faru proponojn.

Nu, sufiĉe da antaŭparolo, iom da interesaĵoj.

ABONU
ROK-GAZET'-n

En ĝi ĉion pri
Esperanto-Rokmuziko

4 numeroj jare

Jara abonkotizo
100FF aŭ 32 IRK
(Internaciaj Respond-Kuponoj)

ABONKUPONO

Asocio:...............
....
P.Nomo:...............
F.Nomo:...............

Adreso:...............
....
....

Tel:..................

☐ Mi sendas ĉekon aŭ Poŝtmandaton al EUROKKA.

☐ Mi ĝiras 100FF al poŝt-konto de la banko de EUROKKA
CCP N° 274809
CCM Toulouse ST Agne
34 avenue de l'URSS
31400 Toulouse
en nia konto:
B15999 G2206
N°C40247960 C1 10

☐ Mi sendas 32 IRK al:
EUROKKA-Rok-Gazet'
Esperanto-Rok-Asocio
F-31450 Donneville
Francio.

ENHAVO

Hej uloj!	3
Tutmonde kaj tre persone	4
Malrokmuziko	9
Afriko	10
Mikke	12
Diskoj, kasedoj kaj eldonaĵoj	14
Serioze	16
Tute ne gravas	18
Koncertoj, Festivaloj kaj kunvenoj	20
Teksto kaj muzik'	22
Rokmuzika reto	23

HEJ ULOJ !

Bedaùrinde la Ea rokmuziko tre suferas la malharmonion, kiu regas inter valutaj kaj ne-valutaj ekonomioj. Name, la rokgrupoj kiuj produktas per propra mono kasedon/diskon, ne havas iun ajn rimedon por samtempe re-havi siajn kostojn kaj povi disvendi en la sen-devizaj regionoj; aliflanke la junaj ŝatantoj de tiu muziko, kiuj certe ne povas aĉeti tiajn varojn per devizoj (krom kelkaj esceptoj raraj), devas kontentiĝi per malbonkvalitaj kopioj en la plej bonŝanca kazo, per nenio ofte.
Organizo de koncertoj ankaù starigas aĉajn demandojn: Kiel permesi al neriĉaj grupoj koncerti, dum la asocioj plej-multe (krom 1-2 esceptegoj) estas sen-monaj ?????
Floreal kaj Andrzej (Broda) jam multe perletere debatis pri tio. La grupanoj interalie de Ampli-fiki kaj de Persone ege cerbumis pri tiaj aferoj, sed la solvoj certe bezonas kuraĝon kaj ĉefe, imagkapablon.
La debato estas malfermita! Ni esperas fari dosieron tre kompletan kaj pozitivan pri ĉiuj solvoj en la venonta numero. Ĝis tiam kontaktu nin!

Sed jam, du homoj konkrete (inter aliaj komprenebla) agas por disvastigo, ĉefe laù interŝanĝoj.
La unua estas Johann Pachter, kiu bonege konas Pollandon, kaj kiu estras sian libroservon. Li disvendas rokkasedojn, kaj ĉe orientlandaj asocioj li inter-ŝanĝas ilin kontraù Eaj varoj, zorgante pri egalvaloro ambaù-flanke.
Ĉe la Eurokka flanko, unuaj provoj klopodas okazi; eblus interŝanĝi Eajn rok-surbendigojn, aù Eajn kaj ne-Eajn...ĉio eblas.
Vi skribu aù telefonu se vi havas ideojn!
(nur memoru ke estas malfacile vendi entute!).

Johann Andreas PACHTER
Dipl.-Forsting. (FHW)
Zum Kreutle 8
D-7480 SIGMARINGEN-Jungnau
Tel. (0) 7577 - 3449



TUTMONDE KAJ TRE PERSONE

Ankie v.d. Meer, de la grupo KAJTO:
"...fari muzikon en Esperanto, ĉar estas tre belsona lingvo kaj oni ne estas ligita al certa muzik-stilo.
La ideo ke Zamenhof eltrovis ĉi-tiun lingvon por inter alie krei lingvan egalecon inter la diversaj popoloj inspiras min."




Kajto: Ankie Van der Meer
Oudeweg 97
NL-9201 EK Drachten (FR.)
Nederlando.
Tel: 31/51-20-30-048.

Aleks Melnikov iam dum sia ĉeesto en Parizo, parolis pri soveta grupo kiu nomiĝas Kredo. Li eĉ posedis kasedon kiun ni rajtis aŭskulti sed tute ne kopii (eĉ ne por Flo kaj Eurokka).
Malgraŭ la sekretemo kaj mallonga aŭdado, aspektis la muziko sufiĉe bona. Kelkaj pecoj ja ŝajne estas tre bonaj, sed ne eblis vere scii pro la malbona kvalito de la kasedo.
Unuvorte, ni scivolemas.

Ili skribis pri iu eldonata kasedo de ili, de tiam; kaj pri tio ke ili volonte ludus dum renkontiĝo...

La estro nomiĝas Oleg Svirskij, lia adreso jenas:
SU-152930, USSR
Ribinsk Revolucii 2-12
O.A.Svirskij.



Roman Bura iom post iom revelacias en la Ea kanzono. 24jaraĝa kanzonisto el vilaĝo proksima el Bjalistoko, li amas ĝisoste Eon, kaj simple muzikon, sed samtempe montras malfidon al certaj moviĝoj en la movado. Roman kantas Zaza-n (Ludoviko L.Z.) kun admiro sed samtempe plendas ke li prenis lin en tia senespera afero, en mondo kie tiom mankas amo kaj libereco.

Jolo

PS: Roman, vi devus surbendigi en Pollando kasedon kun viaj novaj kantaĵoj, pli bonkvalite ol la unua, kaj kial vi tiom malofte koncertas? Mankas vi!
Roman Bura
ul. Krochmalna 3/119
PL-00-864 Warszawa

Mondano en Rio
Aaron fondis la esperantlingvan popgrupon "La Mondanoj" kiu koncertis en pluraj kongresoj kaj festivaloj.
Li dum sia finstudado pasigis unu jaron en Rio de Ĵanejro.
Sed dum iuj stulte brazilumus nenion farante sub la suno, Aaron havis intereson pri la brazila muziko.
Kia bonŝanco!
Per Eo li renkontis Flavio Fonseca, spertulo en tiu kampo, kiu mem estis siatempe farinta Ean diskon.

Aaron skribis versiojn de siaj plej ŝatataj kantoj kaj proponis surbendigi kun ili.
Flavio zorgis pri la aranĝoj kaj muzika direktado.
La rezulto estas tute profesia kaj plaĉa.
Instrumentoj varias de gitaro, saksofono al ĵazpiano tra brazilaj drumoj, kun la specifa voĉo de Aaron, kiu tute nature akordiĝas kun tia muzikstilo.

Parolante pri "L. M......" onidire, ili preparas sian grandan revenon sur la Eaj scenejoj, eble kun novaj kunludantoj. Sekvo en la venonta numero!

Adreso de Aaron:
Aaron/AHOI
Burgemeisterstr.2
1000 Berlin 42
Germanio



T.B.C!
Ne eblas ne vidi tiun grupon dum koncerto. La vortoj mankas por priskribi la impreson, kiam Huŝi aperas kun la malgrandeta gitareto sur la ventro, kaj kantas akre pri gejoj kaj vivkondiĉoj en Hungario.

Malantaù li, konservladskatoloj kiuj konsistigas la drumon, en angulo knabineto serioze kantante maldecegaĵojn, ne, ne eblas rakonti. Ili eĉ produktis kasedon sed ĝi valoras plej se oni dum aùskultado povas memori ilian troigeman fantazion dumkoncertan.

Elstare ludas Balaĵ, per la plej neoftaj iloj, kaj daùre Huŝi en la mezo mimante la vortojn de kanzonoj, por la surduloj en la publiko. Invitu ilin! Ne estas certe ke vi ne bedaùros, ĉar ili ne estas montreblaj al ĉiuj maljunaj klubanoj en via urbo. Sed almenaù vi amuziĝos.

Kontaktu la kantistinon;
Adrienn Wospil
Klapka u 5/A 3300 Eger
Hungario

"La bleka Forfikulo kaj siaj Orelboristoj". (ekzistas ŝajne 2 Orelboristoj, sed neniu vidis ankoraù la grupon). Foje dumnokte iu metas kasedon en la leterskatolo de Floreal en la radiostacio. Ĝi enhavas kantojn de la plej sekreta grupo Ea. Ili foje ŝokas, foje obtuzas, foje tute ne kompreneblas kaj foje oni duonmortas pro rido. Vi simple opiniu mem. Rok-Gazet' donas al vi ekzempleron de la tre, tre specifa gusto kaj stilo de la grupo.
-Ilia muziko estas AKRA!-

Versaĵo en formo de respondo al la homo, kiu proponis sian "Esperanto Moderna" sen scii kiaj postsekvoj okazos. Jen.

Al HDWG

Ho DO DU VO GO
Mi bugras vin
Hidulo Moderna
Mi forfikas vin.

HO DO DU VO GO
Abomeninda ĉarlatano
Hidulo Moderna
Mi forfikas vin.

HO DO DU VO GO
Ne plu fingrumu
Figalimatiaĉon,
Eĉ damnulojn ĝi naùzigas!

HO DO DU VO GO
Bugriĝu inferen!
Al diablo donu
Gonokokojn kaj aidoson!

HO DO DU VO GO
Se devus ekparoliĝi
Via fimodernaĵo
Mi preferus la anglan!

...daùriĝas teksto...

En iu en la venontaj numeroj ni faros pli kompletan prezenton de tiu grupo. Interalie, ili projektas produkti diskon, kiu nomiĝos "Rajdante Harley".



Eduardo Vargas estas ĉefe komponisto. Li kreas muzikon pere de sintesiloj, sub influo de la nuntempa klasika muziko kaj de la nuntempa rokmuziko. Samtempe jes. La rezulto estas tre originala, kaj laŭ ni tre subteninda.

Krom kelkaj malgravaj teknikaj problemoj, li ĉefe suferas pro manko da kontaktoj kun aliaj Eaj muzikistoj. Do, oni povas senti tion en liaj tekstoj; li bezonus iun kiu povus aŭskulti kasedon kaj konsili pri rimado, versado...

Laste li finis surbendigi kantojn sur kasedoj, kiun li prezentis jam dum renkontiĝo. Ŝajne ĝi iel akireblas?!

Krom tio, li sentas sin kiel pioniro de Eo kiel muzikisto en Malago, malgraŭ primokoj de kelkaj anglemuzikantaj uloj kiuj (ankoraŭ ne) vidas intereson muziki en nia lingveto.

Do tamen, li aranĝas (is?) spektaklon kun baleto, kun lia muziko.

Lia kontaktadreso:
Eduardo Vargas
Ayala 5 4°D
29003 Malaga Hispanio

Franĉjo ne nur desegnas -eble li donacu al Rok-Gazet' kelkajn grafikaĵojn, oni tre dankemus, ho jes!-, ne nur parolas en la loka radio stacio sed! Li studadis pianon dum dek longaj jaroj en la muziklernejo. Espereble li trovos aliajn muzikludantojn kaj eĉ aperos nova rok-muzikensemblo.

Francisco Luis Veuthey
Neuquen 848
RA-3530 Quitilipi (Cho.)
Argentino

Estas 23. De 12 jaroj muzikas (ludas pianon kaj orgenon). Multe ludas, en grupo "JOT-WU-BAND". Tiu-ĉi bando ludas blus' kaj kantri-muzikon. En la angla ĉio, eĉ la propraj komponaĵoj. Sed Robert foje iomete kantas Ee, bedaŭrante ke li havas problemetojn kun la verkado de tekstoj. Ĉion kio povus helpi lin en tio vi donu al li, se vi povas. Li ŝatus ricevi sonbendojn, notojn, revuojn kaj Eo-kantojn kun notoj kaj teksto. Li volonte redonus per kasedoj, diskoj ktp..

Robert Piotrowski
ul.Lipowwa 17
18-423 Woj Łomza
Prytuły Pollando

Leo Koleswikov diras pri tiu aĉa problemo, ke en Sovetio esperantistoj ne ĉiam povas ludi pro manko de instrumentoj. Li mem ludas gitaron, sed serĉas drumon, kio ne estas produktaĵo en Sovetunio, do eblas nur akiri usonan aŭ japanan, kaj oni ja imagas ke tio multege kostas. Cetere, oni organizas en Moskvo Ean Muzik-Video-centron, kaj li bonvenigas ĉiujn tie.

Leonid Kolesnikov
"gagarina" 65-1
SU-293720 Drogobic
Ukrainio USSR

Mistero, mistero!
La grupo Persone, nun triopo, ne diras tre multe pri si mem.
Mi insistas. Estu en la dua numero de tiu-ĉi fangazeto detalaj informoj. ...minaco validas por ...n kaj la aliaj mondanoj.

Persone: Bôrje Lund
örsta, Lid
S-611 91 Nyköping
Svedio.

Alia mistero ĉirkaŭ la japana rok-bando "La Mevoj". Iam oni ricevis provkasedon, kaj de tiam eĉ ne unu noton. Se iu en Japanio ion scias pri ili, tiu ja avertu kaj nin, kaj ilin. Estas tro malmulte da Eaj rokgrupoj por perdi eĉ unu debutantan.



Ŝi nomiĝas Christine kaj ludas drumon. Treege ŝi deziras ludi en grupo kaj lerni Eon. Krom tiu knabino, alia (amikino de ŝi) kiu klavarumas kaj kantas same aliĝus al tiaspeca ideo.

Ili preferas "progresivan" rokmuzikon (pardonu la neologismojn!! Bertilo helpon !). Diable kio estas "progresiva" roko ? Io kiel la muzikstilo de Peter Gabriel se iuj imagas kia stilo povas esti. Prefere skribu rekte al Christine por akiri priskribon.

Christine Puig
19 rue Offenbach
31500 Toulouse FR.

Lastminute-Lastminute-Lastminute......

GVIDLIBRO PRI MUZIK-TERMINOJ EN ESPERANTO

Andreo Marshall petas la proponon de inkluzivotaj terminoj en la formo de citaĵoj kiuj nepre montru la uz-manieron, aŭ per difino en Esperanto (ne en nacia lingvo) aŭ per uzo en frazo.
Muzikaj citaĵoj ankaŭ bonvenas.
Proponojn oni sendu al Andreo Marshall, 42 High St. Waltham, GRIMSBY, S. Humb., DN37 OPL, Anglio.

Pri Alex Mas eblas diri ke, unue rimarkeblas lia desegnemo . La desegnoj kun subskribo "Cruella de Ville" kiuj abundas sur tiuj-ĉi paĝoj estas liaj. Li laste faris kovraĵon por la disketo de Amplifiki/Rozmariaj Beboj. Ĝi cetere similegas al la kovraĵo de la gazeto. Imagu ke, li estas tut-kompleta rokbando, li kiel unuopulo. Efektive, lia loĝejo estas laboratorio kun pluraj muzikiloj, kiujn li ĉiujn ludas.

Kaj finfine, li promesis veni al la ĝenerala asembleo de Eurokka. Eble unu el la venontaj sukcesuloj!

Kontaktadreso
Alex Mas
20 rue Bénard 75014 Paris
Francio



Jen pri Jurij Mylnikov. Li muzikas kun 2 lokaj grupoj, kaj rilatas cetere kun la revueto SeveROK, kiu aperigas pri Rokmuziko, kies gvidanto lertas kaj spertas en koncert-aranĝoj (sonas tre interese, ĉu ne?)

Unu el tiuj du grupoj estas el lia urbeto Kotlas. Ĝi estas nova, konsistas el profesiaj muzikistoj kaj eĉ, konsentas esti pure Ea!

Pri la grupanoj;

Jurij Mylnikov: komponado, versado, kanto kaj manaĝerado

Vitalij Arŝinov: Komponado, kanto

Aleksej Kovkov: klavaro

Jurij Nastenko: saksofono, harmoniko

Aleksandr Kovkov: bas-gitaro

Aleksej Maĥin: gitaro

Aleksandr Anikin: drumo

La bando nomiĝas "insulo de Miĥej" (Miĥejkov ostrov).

Adreso de la bando estas:
Jurij Mylnikov
st. Ĉernyŝevskogo 16-3
u. Kotlas-11
reg Arĥangelskaja 165411
USSR

MALROKMUZIKO


Li ludas klarineton en la armea fanfaro de Ĉinio, kaj membras en la Pekina muzikista Eo-asocio.
Lia nomo estas Cheng Yonghua.
Li havas kontaktojn kun unuopaj muzikistoj eksterlandaj, sed ne jam kontaktis grupon (ĉu Eurokka estas "grupo"?).

Anonceto; nuntempe li bezonas anĉojn por klarineto.

Eble iu povas helpi al li.

Cetere, li pensas ke estus bona ideo ke iuj vizitu ĉinion por fari rok- aŭ ĵazkoncerton. Kiu havos la ŝancon?

Cheng Yong Hua
P.O. Box 2421-3
100081 Beijing
Ĉinio.



Jam de ses jaroj agas grupo da muzikemaj knabinoj en-kadre de la kantensemblo Espero.
La membrinoj de la ensemblo partoprenis multajn aranĝojn en- kaj ekster-lande inklu-zive de la Artaj Konfrontoj en Esperanto.
Espero gajnis trifoje la unuajn premiojn en la kanto-konkurso organizita ĉiujare en Bydgoszcz.
Ĝi spektaklumas ankaŭ antaŭ neesp-a publiko.
Laste la grupo preparis novan programon, kaj se oni deziras pli da detaloj, oni kontaktu la gvidantinon Anita Nowakowska.
(Ĉu eble iuj memoras la kelkajn -tro malmultajn koncertojn kiujn Anita faris, kune kun alia knabino? Ŝi nepre devus aperi pli ofte sur la Eaj scenejoj!)
Adreso:
Młodziezowy Dom Kultury Esperanto
Lampego 17 skr poczt.41
75 012 Koszalin Pollando
tel: 94-246-73-posttagmeze



AFRIKO

Tufuene Mafuila, tio nur estas lia oficiala nomo. Sur scenejo lia nomo estas Zhou-Mack.
Li aĝas 25, cetere havas saman naskiĝtagon kiel mi (30a de Aŭgusto)...

Do, laŭ orde:
li fondis kaj estras la Zairia Eo-junularo.
Fondis kaj estras la muzikensemblo "Esperanto muziko", iama "Universo" kiu ŝanĝis la nomon ĝuste por emfazi la Eiĝon.
La muzik-stilo de "Esperanto Muziko" estas la tiel-nomata "regeo" sed ĝi estas miksita kun tipe afrika, ĉefe zairia tradicia muzikritmo, kiun oni nomas "ngoma" (legu same kiel en Eo). La vorto ngoma signifas tamtamo en la lingvo Kikonga.
Esperanto Muziko havas sufiĉe vastan repertuaron originalan, kiu estas verkita de Zhou-Mack.
Antaŭnelonge, pretiĝis sonbendo kun 10 kantoj, kiu estos iel produktita, surkasede aŭ surdiske.

Esperanto Muziko profesie muzikas esperantlingve en Afriko.
Sed, Zairio estante malriĉa lando, estas malfacile vivteni grupon kun 11 muzikistoj!



• Muziko: En Zairio aktivas minimume tri Esperantaj muzik-grupoj je duon- aŭ plene profesia nivelo. Ni jam havis okazon mencii la grupon en Kisangani, sub gvido de Lufimpu Lukolama, kaj tiun en Boma, en kiu ludas Mafuila-Tunga Mavomo. Lastatempe la grupo "Universo" en Kinŝaso laŭ instigo de Tufuene Mafuila ŝanĝis sian nomon al "Esperanto-Muziko", signale la fakton, ke ĝi nun kantas plejparte en Esperanto. Ĉiuj tri grupoj deziras disvastigi sian muzikon pere de sonbendoj, kaj bonvenigas kontaktojn kun alilandaj muzikistoj. La adresoj: BP 409, Kisangani (Haut-Zaïre); BP 34, Boma-II (Bas-Zaïre); p/a Bonkufu-Bobandida, BP 1028, Kinaero (Kinshasa).

el ESPERANTO



Ĉefproblemo estas certe tio, ke la ensemblo ne posedas proprajn elektrajn muzikilojn, kaj pro tio pagas altajn lukostojn por ĉiu koncerto. Pro tia manko da instrumentoj la grupo tro malofte sukcesas koncerti, kaj pro tio estas sen mono.

Ĉiuj muzikistoj de la bando vivas en komuna domo, E-etose kaj malriĉe.

Du aferoj estas petataj. La unua temas pri manko de surbendigilo: eble ie troviĝas registrilo kiun la grupo povus ricevi, por povi surbendigi iliajn kantojn.

La dua afero estas koncertoj. Tia muzikensemblo povus turnei kaj koncerti en aliaj landoj kaj kontinen**toj**, kondiĉe ke troviĝus taŭgaj organizantoj. La grupo atendas proponojn.

François Boulet ludis mallonge (en Zagrebo) en la grupo Amplifiki. Nuntempe li loĝas en Niamey, kaj surloke muntiĝis sufiĉe bona grupo: kelkaj eŭropanoj kun kelkaj afrikanoj ludas ĵaz-rokmuzikon.
Ludas pianon kaj fluton, Georges Makintosh, kiu iam ludis kune kun Herbie Hanckok. Tre bonega drumisto-kantisto-komponisto estas Michel, la Beninano.
La aliaj kiuj provas sekvi frenezan ritmon estas François ĉe gitaro, Pip kun saksofono, Pascal kun basgitaro kaj Albert kiu ankaŭ ludas la gitaron.
Ili suferas kelkajn misaventurojn (priŝtelo, akcidento, ktp...) sed ili konsentus esperantiĝi. Kia bonŝanco, unu jam parolas kiom devas; oni nepre konvinku la aliajn, ĉar tiu-ĉi grupo aspektas tre simpatia, eĉ nur tra kasedo!
Kontakto:
François Boulet
Lycée La Fontaine BP 529
Niamey Niger



El Kinshasa:
28jaraĝa, verkas kaj kantas rokajn kantojn en Eo. Mayoma-Diankembo bezonas iom da helpo por vendi liajn kantojn.
Aliflanke li ne havas virgajn kasedojn kaj se VI posedas nebezonatajn vi ĉiam povas sendi.

Mayoma Diankembo
B.P. 152 Kinŝasa 7
Kinshasa/ Zairio

Mikke

Eurokka : Mikke Englund, vi estas la gitaristo, kaj por la unua fojo, kantisto de la rokbando AMPLIFIKI. Oni scias, ke la grupo surbendigis jam kasedon antaŭ tri jaroj, kaj ĝi vendiĝis multnombre. Kial fari nun duan kasedon?

Mikke : Do, la respondo estu, kial ne!? Estu kiel ni povis atendi tri jarojn por fari ĝin...Se estus laŭ nia volo ni jam post duona jaro farus duan kasedon ĉar ni de longe havis sufiĉe da kantaĵoj, sed ni ne havis la monon, aldone membroj de la grupo vivas en diversaj landoj k.t.p.. malfacile aranĝi!

Eurokka : oni povas senti sufiĉe signifan ŝanĝon de la stilo inter la du kasedoj, tekstoj en la dua ja pli ofte temas pri amsentoj! kiel vi klarigus tian evoluon?

Mikke : se oni rigardas kiuj verkis la kantaĵojn, de la unua kaj de la dua kasedo, oni facile rimarkas ke mi faris malpli da kantoj ĉifoje ol por la antaŭa eble tio estas la kialo.

Eurokka : AMPLIFIKI havas specifaĵon: ĝi estas la sola grupo kies anoj vivas en diversaj landoj. Ĉu ĉi-tio estas avantaĝo aŭ male?

Mikke : la respondo devas esti ke 'Esperanto ne konas landlimojn". Ni estas tutsimple kvin homoj kiuj kunkune ludas muzikon.

Eurokka : kion vi opinias pri la Ea rokmuziko ĝenerale?

Mikke: tio estas malfacile pripensi sed la manko estas: mi konas milojn da grupoj, kiuj kantas en la angla, la sveda...kaj mi konas eble kvin kiuj kantas en Eo. Mankas ekzemple vera blus'ludanta grupo kaj pli da aliaj muzikstiloj.

Eurokka : ĉu vi kredas ke la fakto, ke jam ekzistantaj grupoj surbendigas kasedojn, diskojn kaj koncertas instigos novajn grupojn formiĝi?

Mikke : kompreneble se ili vidas ke tio funkcias, kanti en Eo kaj fari diskon. La Eo-medio estas sufiĉe bona por disvastigi en multaj landoj la propran muzikon, ĉu per diskoj, ĉu dum koncertoj.

Mi certas ke AMPLIFIKI multe helpis al aliaj grupoj trovi la vojon.

Eurokka : oni povas kritiki tion, ke la tekstoj de rokmuzikaj kantoj estas tre simplaj. Kion vi diras pri tio?

Mikke : vi pravas kaj ne pravas. Pri iuj grupoj vi ne pravas, kiuj havas preskaŭ ne kompreneblan tekstaron dum aliaj, verkas nur pri amo...ne eblas diri tro ĝenerale.

Eurokka : ĉu la dua kasedo havos sukceson?



Mikke : mi esperas eble eĉ pli ol la unua. Estas ege diversa. La kvalito estas pli bona. Nia publiko, malgranda sed tamen nia publiko espereble ŝatos ĝin.

Eurokka : ĝi tute aspektas kiel laboro en studio, male ol la antaŭa provo kiu estis surbendigado kvazaŭ de koncerto.

Mikke : povas aspekti kontraŭaĵo ke la kasedo estas studia laboro dum niaj koncertoj estas sufiĉe spontanecaj.
Mi esperas ke tamen ni povas surscenejigi kaj eluzi tian praktikadon en la studio.

Eurokka : oni scivolemas kiel grupo povas funkcii dum vi ĉiuj loĝas mil aŭ dumil kmjn for unu de la aliaj kaj estas malfacile ĉiuj kuniĝi. Kiel vi ekzercas la kantojn, kiel vi aranĝas la melodiojn?

Mikke : ne ridigu min. Ĉu vi mensciis la verbon ekzerci? Ni preskaŭ neniam povas. Tiu kiu verkas kantaĵon sendas sur kasedo al la aliaj (espereble), aŭ eventuale eĉ telefonas. Tamen iel tiel funkcias; kiam ni venas por koncerto, ĉiu scias kion fari. Ĝis nun funkciis.

Eurokka : kion vi pensas pri la organizado de viaj koncertoj dum kultur-festivaloj, kongresoj, kaj aliaj? Kiel la organizantoj traktas la rokgrupon?

Mikke : Tute persone mi respondas: ni ne povas plendi. Kompreneble estas amatoroj kiuj sen iu ajn gajno, devas sammomente prizorgi multe da aliaj aferoj. Ili faras sian maksimumon.

Eurokka : en tio ke vi ludas Eajn rokkantojn, kiom da estas emo al disvastigado de Eo, kiom rilatas al via propra plezuro muziki?

Tio ne estas nia ĉefa celo tamen, plezuro ĉefas.

Eurokka : kiel vi sentas en la ĉiutaga vivo, ke vi ludas en Ea rokbando?

Mikke : do, mi profesie estas poŝtisto. Mi havas sufiĉe da laboro dum la tago. Mi ne havas tro da tempo por pripensi mian karieron kiel Ea gitaristo... Kelkajn semajnojn antaŭ la koncerto mi komencas pensi pri la muziko, pli kaj pli.



Mikke : mi tiom ĝuas ludi!
Sed iom post iom mi ankaŭ pensas pri la perspektivoj: oni ne devas ludi nur por si mem. Mi esperas kaj kredas ke Eo gajnas pro tio; ĉar Eaj renkontiĝoj devas esti amuzaj kaj allogaj: mi esperas ke ni helpas fari. Pere de tio, iu kiu partoprenis renkontiĝon kiel novulo ĝuis kaj revenos!

Eurokka : kiel Eaj rokgrupoj povus eniri la ĝeneralan rokmuzikan vivon (do la ne-Ean)? Ĉu vi kapablas imagi tian elpaŝon?

Mikke : mi tre ŝatus. Mi vidas ĉefe malfacilaĵojn sed mi tre ŝatus.

Eurokka : via PLEJ SEKRETA deziro por AMPLIFIKI?

Mikke : multajn kasedojn, grandan sukceson en la tuta mondo.

KASED-RECENZO

TEAM' "ORA TEAM'"

Tiu-ĉi ora kasedo aperis jam de kelkaj monatoj, sed indas ke oni konatigu ĝin al vi.

Unue aperis diskego en la slovaka eldonita de la slovaka marko "OPUS", ŝtata marko, kaj poste LF-Koop eldonis esperantan version sur kasedo de la disko.
La bendo estis surbendigita en diĝita studio en Svislando.

Aùskultante la slovakan kaj la esperantan versiojn, oni plej ŝatas la esperantan, eĉ se oni estas ne-esperantisto.
La versio en Eo pli bonsonas, tamen la kovraĵo de la slovaka versio pli belaspektas ol la alia; ĝi multe pli rokaspektas.

La Ea rokmuzika kasedo enhavas kvin pecojn sur ambaù flankoj.
La muzikojn komponis la muzikistoj de Team'.

La esperantajn tekstojn verkis Perla Martinelli kaj Georgo Silfer de LF-Koop.

Oni povas taksi la rokmuzikon de Team' kiel melodia roko; io inter metal-roko kaj radio-rokmuziko (usona aù angle-kantata muziko daùre dissendata de la okcidentaj radio-stacioj pro ĝia facila-komerca aùdo.Ekzemplo estas la rok-bando Europe).

El tiu-ĉi kasedo elstaras kvar pecoj:
"Reklamo al silento", kun vigla gitar-sono, kies teksto temas pri la ĉiutaga slovaka vivo proksimas al kvieta metal-roko.
Laù la sama vojo sekvas "Via eta timo" enkondukita per klavaro, kaj profunda drumado reliefigita per gitar-solo.

Inter versoj de kvazaù am-teksto aperas viglaj klavar'kaj gitar'soloj.

Granda melodia momento alvenas kun "Sur sama ŝipo".
Kortuŝa peco, en kiu ĉiu povas retrovi sin mem. Ne eblas ĝin aùskulti sen sekvi kaj kun-kanteti la refrenon.



Kaj tuj poste, la ĉarmon rompas "L'eta ŝtormo nokta", donante la emon batali en la mallumo.

"En kaĉ" (alia titolo), ni ĉiuj estas por la amo, sed ne nur por tio.

La tekstoj de Team' volonte temas pri amo, kaj laù mi, ne sufiĉe pri la realeco. Oni ne devas forgesi ke rokmuziko naskiĝis de ribelo kaj kontesto.

Ora Team': bona kasedo, bonkvalita, bonsona, far spertaj kaj profesiaj muzikistoj.

Sed mi starigas demandojn:

-Kial ili kantas esperante ?

ĉu pro ilia manaĝero Stano Marĉek ? (li estas aliflanke konata esperantisto)
ĉu pro io alia ?
ĉu iam ili fariĝos esperantistoj ?

-ĉu ili daùrigos produktante Eo-rokmuzikon ?

Mistero en la Ea rokkulturo, ĉu ne ?

Povas esti ke la respondo kuŝas en la unua kanto de la kasedo "Volas ni":

-"Ni ne volas multon, nur la Mondon !"



FLO

la fuŝaventuroj de hjako misull









el eka eĥo n° 1
eldonas JEFO

SERIOZE

La LINGVOUZO ROKA

"Popo estas tutmonda termino, sed ĝia senco tre varias de homo al homo. Vi uzu la vorton laŭ via senco. Vi povas ankaŭ uzi la esprimon "ŝlagromuziko", ekzemple por Sinatra. "Varieteo" ne taŭgas, devus esti"varietea muziko".
Povus evolui pli fiksitaj sencoj de vortoj kiel popo, roko ktp.

Mi uzas "folklora roko" ĉar mi ne volas proponi tro da novaj radikoj. Jam "roko" estas nova vorto. "folkroko" estus ankoraŭ unu. Eo estas lingvo, kiu profitas el multa uzo de kunmetoj -tial "folklora roko" ĉar folkloro jam ekzistas. Sed se vi volas mallongigi "folklora roko" al "folkroko" mi ne protestos.

Pri ŝtonroko mi diras same, kiel pri popo: uzu la vorton laŭ difino, kiu plaĉas al vi. Mi formis la terminon analogie kun "metalroko" (metalo estas pli malmola ol ŝtono), kaj la vortludoj eblaj kun roko ŝtono kaj metalo (kiam venos la diamantroko?) tre plaĉas al mi.
Tamen "hardroko" estas tute bona alternativo. Rimarku, ke la verbo hardi jam havas sencon en Eo, kiu tre taŭgas por la vorto hardroko! Sinonimoj, sinonimoj!

(El letero de Bertilo al Floreal)

Pli kaj pli la rokmuziko finfine eniras nian movadon. Sed ni ĉiuj ~~verŝajne~~ konscias, ke ĝi ne estas la plej forte bezonata sfero de la uzo de Eo. Tamen, ni Eo-parolantoj intertempe vere sektiĝis ne nur pro la specifaj ritoj sed pro la ĝenerala malfermiteco rilate al la socioj.
Simple multaj sobraj, eĉ ne altkulture pretendaj homoj kabeiĝadis perdante la sencon plu okupiĝi pri Eo. La proponaro de Eo-movado al la socioj estas plu malampleksa, multaj ne trovas utiligeblecon de Eo aŭ ne havas forton protekti sin kontraŭ la mokoj. Tial des pli mi subtenas rokon en Eo, ĉar ĝi ne nur plenumas la taskon doni amuzon, sed ankaŭ fojfoje komunikas ion, kio estas komuna por multaj aŭskultantoj. Alivorte do la roko plenumas la bezonon agi grupe, are, kiu tiom forte senteblas en la aĝo de dekkelkaj jaroj...

Venis al mia kapo eventuale utiligi videokasedon de iu Ea rokmuzika koncerto -eĉ amatornivele registrita- kiun ni aŭ organizantoj de iu Ea aranĝo povus pruntepreni kaj per ĝi demonstri.

Andrzej Broda
ul. Jednosci Narodowej 1-3/39
PL-76-100 Sławno Pollando

"Nun ni kontrolos vian konjektemon", diris al mi mia kunparolanto kaj enŝaltis la magnetofonon. Tuj aperis la son-ondo de la afabla nuntempa muziko. Despli atente mi aŭskultis ĝin, despli multe mi turnis mian atenton al la tekstoj, kiuj plej multe plaĉis al mi kaj pli kaj pli mirigis min; la lingvo de la kantoj ŝajnis al mi tre neordinara. Mi tuj rimarkis la mirindan interplektiĝon de anglaj, italaj, hispanaj vortoj; Hazarde mi ekkonjektis; Esperanto!

Skribis en la ukraina
Anatolij Metvijĉuk
Tradukis kaj sendis
Orest Furikevich
USSR 284000
Ivano-frankovsk
Po Box 225

"BEST" estas ne malgrava gazeto pri rokmuziko, kiu aperas en tuta Francio, ĉiumonate, pli-malpli 120 000 ekzemplere. Do imagu, ke ni furioze ĝojis vidi en ĝi la anoncon pri EUROKKA, kiun Flo kun amo kaj pacienco sendis al amaso da gazetoj tiatipaj en la mondo! Eĉ se ĝi estas ne tro granda, aperas la nomoj de la grupoj kaj la klarigo, ke Eo estas internacia lingvo. La poloj ne primoku, en Francio oni devas precizigi tion.

3a KEF en Svedio

24.-27.05.90

Jam la 3an fojon okazos la Kultura Esperanto-Festivalo — ĉi-foje en Västerås en Svedio. Västerås estas mezgranda kaj malnova urbo situanta ĉirkaŭ 100 km nord-okcidente de Stokholmo. La organizantoj antaŭvidas varian kaj kvalitan programon. Teatro, literaturo/poezio, muziko/kanto, prelegoj ktp. havos sian lokon dum KEF 3! Tamen proponoj pri programeroj estas ankoraŭ tre bonvenaj.

Se vi interesiĝas pri partopreno (aŭ se vi volas kontribui al la programo), skribu al *Kultura Esperanto-Festivalo 3, Brunnsgatan 21, S-111 38 Stokholm, Svedio*, kaj vi ricevos informojn kaj aliĝilon, kiam ili estos pretaj.

TUTE NE GRAVAS

KIEL TUTCERTE FUŜI KONCERTON

Nu, vi deziras sukcesi bone fuŝon de koncerto, rok-koncerto dum renkontiĝo aŭ festivalo.
Tio estas tre facila!
La plej efika, ĉar ne kontraŭebla vojo estas lui aĉegan sonsistemon por la koncerto.
La plej profesia grupo, se devas ludi tra malnovaj ruinoj kiel amplifiloj sonos kvazaŭ ensemblo da patoj.
Vi ankaŭ povas dungi anstataŭ valoran kapablan teknikiston, la plej idiotan klubanon, kiu prefere eĉ ne unufoje havu rigardon al la aparataro antaŭe. Son-materialo similas al komputilo en tio ke, se ne estas bona persono por funkciigi ĝin, ĝi montriĝas senvalora.

Notu bone ke, vi eĉ aldone povas perdigi monon de via asocio.
Tio ankaŭ estas tre simpla.
Se via asocio organizas ĉiujare renkontiĝon, tiam ĉiujare iuj ŝvitas por povi rezervi kaj lui la sonsistemon.
Vi nepre ne avertu ilin, ke lui 3/4-foje tion estas jam pli koste ol simple aĉeti mikrofonojn, amplifilojn kaj sonmiksilon ne malbona, kion ĉion oni povas stoki en la klubo kaj lui al aliaj asocioj, dum oni ne mem uzas.

Simile, vi devas eviti disponigi al ili lokon aŭ ekzercejon por la trejnado. Tiam ili devos ekzerci en la dormoĉambro, kie tutcerte ili detruos la elektrikaĵojn kaj vekos la apude dormantajn kunulojn.

Vi ankaŭ povas plani la koncerton ekstere, specife dum malvarma vetero certas, sen averti la najbarojn, kaj estos tre amuze vidi la muzikistojn frostiĝi sur la scenejo dum polico interrompas perforte.

Alternativo estas koncerto en tro malgranda salono kie ne eblas moviĝi nek danci, kun popolamaso ĉe la enirejo kiu grumblas ke vidas nenion.
Aŭ metu amasegon da seĝoj en la koncertejo, tiel ke la publiko estu sufiĉe ĝenata, kaj por sidi, kaj por stari.



Zorgu atente pri la sonkvalito en la koncertejo. Se estas resonoj, plej bone. Bona kontrolo estas ludigi vian plej ŝatatan diskon sur simpla diskoludilo tre laŭte. Se vi ne povas rekoni la muzikon, la salono kongruas kun la celo fuŝi koncerton.



Alia sufiĉe bona solvo estas inviti tiajn grupojn (Internacia orkestro, Internacia koruso, Amplifiki), kiuj povas preskaŭ nur ekzerci dum renkontiĝoj, tage kaj nokte antaŭ la koncerto, kaj plani la koncerton unu tagon post la komenco de la renkontiĝo. Kaj se ili petas veni 2-3 tagojn pli frue por ekzerci, vi nepre rifuzu.

Ankoraŭ eblas aranĝi iun laborgrupon aŭ teatraĵon tuj antaŭ la koncerto; tiam ne eblas fari bone la sonprovon, kaj vi jes bone scias ke sonprovo povas daŭri ĝis 3-4 horojn. Plej ĝuindas tio, se la publiko jam eniris la koncertejon dum la grupo ankoraŭ sonprovas. Vi sendube certas ke duono de la ĉeestantaro fuĝos sen reveno.

Lastaj konsiloj;
ne ludigu la grupon antaŭ neesperantistoj, ĉar estas du riskoj:
varbi novajn E-ojn
gajni monon (se en klubo aŭ koncert-kafejo)

Anoncu la koncerton nur unu tagon antaŭe aŭ eĉ pli malfrue;
Kaj finfine, NENIAM repagu la kostojn de la grupo, tio estas sensencaĵo, ĉar se vi ne observos tiun-ĉi lastan regulon:
-venos el oriento amaso da bonaj grupoj kiujn oni ankoraŭ ne konas
-eĉ el afriko ili povus vojaĝi, kaj fari grandiozan spektaklon (hororo)
-venus tiaj grupoj kiujn konsistigas malriĉuloj kaj studentoj.....
Kaj anstataŭ ol alfronti ĝis nun relative malmulte da bandoj, vi devus elekti inter dekoj da!

KONCERTOJ, FESTIVALOJ KAJ KUNVENOJ

La 18an kaj la 19an de Novembro 1989 okazis la sesa Internacia Kultura Esperanto-Festivalo en la kultur-domo de Issy-Les-Moulinaux ĉe Parizo, organizita de la Unuiĝo Franca por Esperanto, franca sekcio de UEA.

La programo komenciĝis sabate kun franca kantisto Jak le Puil. Humorajn kaj protestajn kantojn konatajn kaj ankaŭ tute novajn kantojn (pri ĉinio kaj okazaĵoj en la orientaj landoj) li prezentis dum unu horo. La lasta kanto kiun li prezentis kune kun la pola kantisto Georgo Handzik memorigis al la ĉeestantaro, bedaŭrinde plejparte maljuna la Varsovian Universalan Kongreson okazinta en 87.

Sekvis Georgo Handzlik sola kantante simpatie.

Georgo ŝajnas al mi esti poeto, pli ol muzikisto, kun interesaj tekstoj, ironiante pri orientaj politikaĵoj, libereco kaj premoj ĉiam akompanata de plaĉa gitar-muziko. Tamen mankis vigleco, perforteco kaj akreco en la voĉo kaj muziko dum li kantis pri kio okazis sur la placo Tian'anmen en Pekino, en Pollando kaj en Ĉeĥoslovakio.

Ne eblus al mi resti tiom trankvila kaj simpatia. Se georgo sukcesus akrigi sin mem kaj doni pli da sento al kelkaj el siaj kantoj tiam li sukcesus vigligi sian koncerton; fakte la hora koncerto estis tro monotona laŭ mia plaĉo.


Post paŭzeto sur-scene aperis Jomo, "La Fuĝinto el Alkatraz", kiu estas krome kantisto de la Tuluza grupo "La Rozmariaj Beboj".

Ekde la unua kanto li vekis ĉiujn kaj subite hazarde mi povis vidi gejunulojn inter la ĉeestantoj. Jomo havas varian repertuaron, kun kantoj kaj muzikoj de la sesdekaj jaroj, ludataj kaj kantataj rokmaniere.

Verŝajne pro tio, li havis sukceson kaj ĉiuj spektantoj ŝatis tiun novan manieron kanti kaj gitar-ludi (nova por esperantistoj memkompreneble).

Kvankam li estas nova esperantisto kaj kelkfoje -eĉ ofte eraras pri akuzativo kaj aliaj Eo-gramatikaĵoj, lia talento estas bone aprezata, eĉ ĉe la maljunularo!

Vespere, ekis koncerto de la nederlanda Folkbando "Kajto". Ĉiam pli kaj pli profesia la bando konsistas el tri kantistinoj kaj unu kantisto kiuj ĉiuj ludas per tradiciaj muzikiloj. Ili donacis viglan vivantan spektaklon en kiu ĉiuj spektantoj mem partoprenis, akompanante ilin.



Plezuro kaj ĝojo aperis sur la vizaĝoj pro tiom ĉarma muzik-kultura vespero.

Dimanĉe inter du teatraĵoj kantis Aaron, unu el La Mondanoj el Berlino, akompanante sin per brazila muziko.
Li brazilumis originale en Esperanto. Cetere, li jam surbendigis kasedon kune kun brazilaj profesiaj muzikistoj en Rio de Janeiro

Bonegaj kantoj brazilaj sed tamen mi plej ŝatus vidi tutan muzik-bandon, kiu estus multe pli vivanta kaj ritmoplena anstataŭ kantisto nur kun registrita bendo. Ĉiukaze, mi tre konsilas al vi aŭskulti lian bonegan kasedon.

Por bone fini la programon de la festivalo, koncertis Roman Bura, konata pola, juna kantisto, kiu akompanas sin per la gitaro; iom bluse kaj svinge kun akraj, amaj kaj ironiaj subversaj kantoj.
Tre taŭgas lia voĉo por tia kantostilo, sed oni ja bedaŭras ke li ne havas aliajn muzikistojn kiu pliriĉigus kaj reliefigus tiujn originalajn verkojn.

Jen alvenas la fino de la festivalo kiu havis tre interesajn momentojn. Sufiĉe da publiko venis sed mi atendis ke estus ankoraŭ pli, kaj ĉefe pli da gejunuloj; ĉu eble venontjare...



La organizantoj faris ĉion kion ili povis, per malgrandaj rimedoj, oni povas sincere gratuli ilin.
Tamen mankas, kiel plej ofte en la Eaj aranĝoj, taŭga sonsistemo kun profesia teknikisto, kaj tiu-ĉi manko ĉiam malhelpas al la prezentaĵoj esti pli altkvalitaj. Ĉu venontjare ?

Esperanto bezonas ĉition.

FLO



Volĵskija Eo-klubo "Samideanoj" organizas internacian festivalon de Eo-arto "EOLA 90", kiu okazos en Volĵskijo (je 16 kmj de la urbo Volgogrado), de la 2a de Majo 90 ĝis la 9a.

La festivalo estos tre granda evento en Sovetio kaj ĝin partoprenos reprezentantoj de la soveta televido, de la landa kaj regiona presaro, de la Volgogradaj televido kaj radio.



La muzika parto de la programo estas ambicia. Koncertos la fama, eĉ famega Internacia Klasika Eo-ĥoro. Nu, se ankaŭ vi deziras kunkanti en la koruso vi povas skribi por ricevi la partiturojn! Sed estis invititaj (oni atendas firmajn respondojn) rokbandoj Eaj kiel Team, Persone kaj Amplifiki. Kompreneble multaj sovetaj artistoj sin montriĝos, kaj tio eble estas la plej interesa afero. Aŭdeblas klaĉoj kaj eĉ foje kasedoj pri kaj de rokbandoj sovetaj.

Sed, la kasedo devas resti sekreta, la klaĉoj mallaŭtas kaj kio pri koncertoj? Ni tre esperas ke tiu-ĉi festivalo estos LA okazo malkovri tiun tiom furorantan (en okcidento despli) sovetan rokmuzikon!

Kontaktu
ESperanto-EOLA
ab.ja,73
u.VOLĴSKIJ 30
Volgogradskaja obl.
USSR 404130

TEKSTO KAJ MUZIK'



T.LOVE estas unu el la plej popularaj polaj rokbandoj. Artur Lesniewicz sendis tradukojn de iliaj tekstoj, vere belaj kaj emociigaj. Jen unu el ili, en kiu oni povas senti, kiel plejparte en la polaj rokkantoj, pri la malhela flanko de la vivo en Pollando.

To wychowanie/
Tio estas eduko

Mi dankas panjon kaj patron pro protekto
Pro familia varmeco kaj kvereloj dum vespermanĝo.
Mi dankas la lernejon pro unuaj kontaktoj
Pro sovaĝaj ferioj kaj nervoziĝoj en necesejo.

Refreno
Patrujon oni devas ami kaj estimi,
Ne treti sur flagon kaj ne kraĉi al emblemo.
Oni devas ankoraŭ en io kredi kaj fidi,
Patrujon ami kaj ne kraĉi al emblemo.

Al knabino
Saluton, kien fuĝas vi, kaŝiĝu sub mia ombrelo,
Tiel forte pluvas kaj malsekas ĉie.
Vi strange indignita respondas, "oni ne rajtas"
Retiriĝas siaflanke, ĉar tiel vin ili edukis.

Al mi ŝajnas, ke vi estas ie malproksime,
Tion oni nur ŝajnigas, ĉar vi ne vere tiom estas.
Mi tiom volus, ke vi freneziĝu,
Mi tiom volus, sed tiel vin ili edukis.

Sendis Artur Lesniewicz
ul Rymarska 2/1
PL-64-920 Pila Pollando

ROKMUZIKA RETO

Jurij Pasečnikov okupiĝas pri eldonado de Eaj kantaretoj, kaj revas tion fari kun ĉiuj kantoj. Li bezonas; tekston, notojn, gitarakordojn!

Jurij Viktorovič Pasečnikov
Abonkesto 873
Tomsk 12 SU-634012 Sovetunio



Riitta Pulli estas aktivulino en la Finna Eo-junularo.

Riitta Pulli
Kulkulstie 3B14
SF-36240 Kangasala
Finlando

Delci Cipriani eĝe laboras por Eo, interalie estras radio programon, ĉe universitata radio. Sendu muzikojn.

Delci Cipriani
Rua valentin Fernandes 62
97050 Santa Maria
R.S. Brazilo.

Vladimir Dvorak estras la ĉeĥan Eo-junularon, kiu inter multaj aliaj aranĝoj aranĝas IMUR (la internacia muzika renkontiĝo). Li celas ke IMUR estiĝu pleje internacia.

Vladimir Dvorak
Junulara Sekcio
de la Ĉeha Eo-asocio
Jilska 10
CS-110 01 Praĥa 1



Timur Aliev emas ricevi ĉe la Eo centro, kies vic-prez. li estas, novaĵojn pri rokmuziko, afiŝojn ktp... Aliflanke, la centro okazigas Eo-tendaron en Junio-Julio, kaj invitas Eurokk-anojn aliĝi. Cetere, li estas 26jara komputilisto kaj ŝatatas Eo, muziko, vojaĝoj...

Timur Aliev
USSR, SU-367002 Maĥaĉkala
Markova 64-8

Josef Sučik
EUROKKA peranto Orientaj Landoj
Masna 9
CS-70200 Ostrava 1
ĉeĥoslovakio.

Liisa Heikinheimo aktive muzikas en studenta ĥoro, do ŝi estas kantema persono.


Liisa Heikinheimo
Mälkelänrinne 5A707
SF-00350 Helsinki
Finlando



Roman Herman deziras helpi al propagando de la rokmuziko ĉe esperantistoj. Li estas 19jaraĝa, tre aktiva en la Eomedio kaj nature, granda favoranto de la rokmuziko.

Roman Herman
Pod. Koupalistem 730
CS-293 06 Mlada
Boleslav 6
ĉeĥoslovakio.





Oleg Pavlov
nome de la redakcio de la revuo "Severok", kiu priskribas okcidentan rokmuzikon, petegas materialon ne nur pri la Ea rokmuziko sed ankaù pri rokmuziko angle, france aù germane.
Li ankaù proponas okazigi koncertojn laù sendeviza interŝanĝo; organizantoj en Sovetunio aranĝas koncerton kaj loĝigas la invititan bandon, dum alia organizanto en okcidento faras la samon por soveta rokbando. La grupoj kiuj koncertas povas ankaù esti ne-Eaj.

Oleg Pavlov
Vinogradova 121-3 K 50
SU-1630001 Arĥangelsk
USSR.

Neil Mac-Killigin
opinias ke turneo de Ea rokmuzika grupo en Britujo, por ĝenerala publiko, estus grandioza varbilo por nia lingvo. Laù li Amplifiki aù Persone estus sufiĉe altkvalitaj por fari turneon komerce en Britujo, eble kiel grupo kiu "subtenas" bonkonatan grupon por varmigi la aùdantaron ktp.
Li kontaktas organizojn kiuj povus helpi finance.

Neil Mac-Killigin
68 Rose Hill
Oxford
OX4 4HS
Anglio.

Georgo Kamaĉo
preparas analizon de kelkaj kantoj de la grupo Persone.

Georgo Kamaĉo
Välkkylä 2 C 311
SF-90100 Oulu
Finlando

Ewa Wołczyk
estas 20jara liceanino. Ŝi ŝatas rokmuzikon, pop- kaj ĵazmuzikon ankaù. Ŝi interesiĝas pri aĉeto kaj interŝanĝo de kasedoj.

Ewa Wołczyk
ul.26 Marca 27/31
44300 Wodzisław sl
Pollando

Altadill
estas vendejo de diskoj kasedoj kaj aliaj muzikaĵoj, kiu esperas vendi ankaù niajn rokmuzikaĵojn.
Oni ankaù demandas pri la klaĉo, ĉu la muzikisto Alan Stivell estas esperantisto?? Kiu scias??

ALTADILL
Berenguer IV,23
Tortosa (Tarragona) 43500
Hispanio



Tiu-ĉi bonega desegnaĵo kiel du-tri aliaj en ROK-GAZET' venas el iu provizore dormanta tre malgranda gazeteto no nomita Eka Eĥo, farita de Ĵolo. Ĵolo, esperebe konsentos kaj daùrigi kun Eka Eĥo (nur aperis 2 numeroj, ĝi estas ja tempaltempa revuo), kaj desegni por ROK-GAZET'.

Jens-Petter Hansen
redaktas la nordian junulgazeton "Kvinpinto". Li bonvenigos recenzojn, artikolojn...

Jens-Petter Hansen
Kvinpinto
PB 6
SF-01651 Vanda
Finlando

Eo-Klubo KOKO
eldonas gazeton, kiu pritraktas kulturajn temojn; do recenzoj kaj intervjuoj de grupoj bonvenus.
Pensu ankaù pri fotoj ankaù por ROK-GAZET'

„KOKO"
B. Markača 1
YU-43350 ĐURĐEVAC
Jugoslavio

****

Anna Margareta Ritamäki
aranĝas la kvinpintan semajnon, renkontiĝo kiu ŝajne estos unu el la plej rokecaj, kun kelkaj koncertoj kaj ĉeestoj kiuj ĝojigos la fanklubanojn.

Anna Margareta Ritamäki
Peltolavägen 6 B 36
SF-20720 Åbo
Finlando

Max Wearing
estras junulgrupon en la universitato de Adelaide.
La gejunulojn tre interesas kasedoj kun presitaj tekstoj ktp...
Li kontaktas kun iu junulo, kiu havas propran studion, en kiu li surbendigas la kantojn de lokaj grupoj.
Unu el ili estas grekaùstralia, alia aborigena.
Ekster Aùstralio la gejunuloj havas ja granadn scivolemon pri la aborigenoj.
Muziko estas ĝusta politika mesaĝo por transdoni.

Max Wearing
30 Westbury Street
Hackney SA 5069
Aùstralio

Janusz Motykiewicz
multe laboras kun junularo kaj havas junulajn hobiojn; muzikon, turismon, babiladon...
Li proponas interŝanĝon de surbendigitaj kasedoj de Eaj rokgrupoj kontraŭ Eo-libroj aŭ polaj kasedoj kaj diskoj, aliaj aĵoj.
Li aktivas por disvastigo de la agado de Eurokka.

Janusz Motykiewicz
PL-67-240 Kotla
Pollando.

Andrej Ananjin
estas grava homo en la Ea junularo.
Listo de liaj postenoj estus tro longa!
Sed li interesiĝas pri Eurokka.

Andrej Ananjin
Taŝtagol SU-652970
Kemerovskaja obl.
Junulara Eo-centro
Sovetio

Tatjana Kriger
estras klubon en la urbo Jalta.
Ŝi proponas interŝanĝi rokgrupojn aŭ aliajn artistojn. Ŝi povas sendi bonajn sovetajn rokgrupojn kiuj jam sukcese koncertis en Italio, Nederlando ktp..

Tatjana Kriger
Esperanto-Klubo
"Verda Haveno"
O. Pjatkovskij
Str. K. Marksa 7
SU-334200 Jalta
USSR.

Manoel Blaz Garcia
respondecas pri 1hora Ea programo en la radio kaj li CERTE interesiĝos disaŭdigi muzikon.
Do sendu kontribuojn.

Manoel Blaz Garcia
Respondeculo pri Radio-programo
Sorokaba Eo-klubo
Rua da Penha 455
Cx Postal 234
BR 18001 Sorocaba (SP)
Brazilo



Dmitrij Lisenko zorgas pri la Tut-sovetia Festivalo de Eo-arto "Eola 90". (vidu alian artikolon).

Dmitrij Lisenko
Eo-klubo
Dvorec Kulturi "Oktjabrj'
u.Volĵskij 30
Volgogradskaja obl.
USSR 404130

Atilio Orellana-Rojas pro tio ke muziko estas vere kaj konstante ŝatata de ni, la gejunuloj, interesiĝas pri la laboro de EUROKKA. Li prezidas la Ean junulgrupon de sia urbo, kaj ili atendas informojn pri la Ea rokmuziko.

Atiljo Orellana-Rojas
C.C. Nro 1428
RA-5000 Corodoba
Argentino

Jean-François Blin proponas krei spektaklon, prezenti rokgrupon aŭ kantiston en la Eocentro.

Blin J. François
17 rue du Saucy
Bonnard
F-89400 Migennes
Francio

Ela Malik estas tre ĉarma. Krom tio ŝi energie organizas ĉiujare (?) Artajn Konfrontojn en Eo (ARKONES). ARKONES povus esti unu el la revelaciaj art-aranĝoj, kiuj permesos al la Ea rokmuziko eksplodi. Nepre oni kontaktu ŝin, kiel jam skribite ŝi estas tre simpatia!

IXa Artaj Konfrontoj en Esperanto

(ARKONES '90), Poznań

19.-21.10.


Kultura Esperanto-Centro "Orbita",
os. Kosmonautów 118,
PL-61-461 Poznań

Vilnius Radio Esperanto prezentis Eurokkan dum sia elsendo, kaj grupojn kiel Kajto kaj Rob de Nijs (nederlanda kantisto). La Ea elsendo estas 4 minutoj dufoje semajne pri ĉiuj aktualaĵoj.

Vilnius Radio
Esperanto
Litovio USSR

Marcelo Montenegro estas junulo el la provinco Bonaerio (Buenos Aires). Bonaerio estas la lulilo de roko en Argentino. Argentino havas ege fortan rok-movadon, oni eĉ nuntempe eksportas.

Marcelo Montenegro
Luis Braille 553
RA-1888 Florencio Varela (BA)
Argentino



Fino Margaret Wilton de longe ne plu ŝatas rok-muzikon! Pop-muziko ja havis tian rolon dum ŝia junaĝo.
En Britujo, homoj kiuj laboras en ĉiuj branĉoj de la spektakl'komerca industrio vojaĝas tra la mondo sen ion scii pri nia internacia lingvo; Ŝi aktivas en informado pri Eo al tiu-ĉi medio. Ŝi kontaktis interalie kant-kvaropon Kantabile kiuj kantas klasike kaj popmuzike; ili favorus kanti en Eo.



Cantabile (aŭ Kantabile se se ili ekkantos en Eo) kanrokvaropo, kun ege diversaj kantospecoj, kiuj kantas jam en multaj lingvoj, kaj eble iam en Eo. Por tio laboras Margaret

Margaret Wilton
35 Branchton Road,
Greenock,
Renfrewshire
PA16 OXT
Scotland /Britio.



CANTABILE

THE JOLLY GOOD PRODUCTION COMPANY
First Floor, 71 St George's Square, London, SW1 England
Tel 01 630 5302

Przemek Grzybowski akceptiĝas ĉe la pola radio en Bydgoszcz kaj en tri studentaj radio stacioj regionaj. Do li povas diskonigi al duono de Pollando Eurokkan kaj muzikon.
Ankaŭ li emas verki por Rok'Gazet'. Li estas BONVENA !

Przemek Grzybowski
Poŝtkesto 23,
PL-85-149 Bydgoszcz 39
Pollando.



Abaddon (Pl.)

Hanna Hjelt;

= knabino kiun

ROKO tre interesas !

Hanna Hjelt
St alarmsgatan 34D8
SF-20810 Åbo

Wang Jiong Wai povas informi pri ĉina rokmuziko sed ne konas E£an rokgrupon. Nun en Ĉinio ne ekzistas.

Li estas 21jaraĝa, kaj aŭskultas rokmuzikon almenaŭ 1 horon ĉiutage. Li preskaŭ freneziĝas pro rokmuziko!


Wang Giong Wai
55a Hao 799a Lon
Tiang Tong Lu
Shanghai 2000 85
Ĉinio

LA DISKETO DE LA 90-aj jaroj !

Entute 4 pecoj da rokmuziko !

AMPLIFIKI,
LA ROZMARIAJ BEBOJ
KAJ.......EUROKKA
PREZENTAS AL VI Vinilkosmo





Prezoj (1 disketo + Sendo-kostoj) :
- Eùropa Komunumo = 29FF aù 9 IRK (Internaciaj Respond-Kuponoj)
- Aliaj Eùropaj Landoj = 31FF aù 10 IRK
- Ameriko, Afriko, Azio = 37FF aù 12 IRK
- Oceanio, Japanio = 40FF aù 13 IRK

Mendu ĉe EUROKKA

Imprimerie Mecanographie Puylaurens 63 75 24 61